



Kulturaj Kajeroj

É. MAHÉ →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Bonfara : 10 fkoj / Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

MARTO - APRILO

1963

2

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagô 4)

KULTURAJ KAJEROJ

1963

Marto - Aprilo

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rocheport-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna repesaĵo.

ENHAVO

..

Pli bone per ol pri (P. Babin).

Esperanto tra la mondo.

El ie en la mondo :

Samarkand (I) (P. Poliščuk).

Esperanto Koboldo (I) (F. Szilagyi).

Kelkaj gravaj datrevenoj.

Turismo arkeologia :

Oppidum'o de Enserume (I) (J. Salasc).

Rousseau en la Hungara radio (P. Balkanyi).

Historia mistero (E. Motillon).

Por via distro :

Nia konkurso.

Bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

PLI BONE PER OL PRI

Dum mi verkas tiun artikolon, en la kastelo Grésillon, bruadas ĉirkaŭ mi voĉoj, jam konataj voĉoj de amikoj de longe regulaj vizitantoj de la Kulturdomo, kaj voĉoj nekonataj, tute freŝaj de multaj gejunuloj, novbakitaj esperantistoj. Ili estas 60, kiuj ricevis oficialan monhelpon de la franca ŝtato por partopreni en la Kultura Semajno organizita en la Esperantista Kulturdomo. Per grupetoj ili venis el ĉiuj « anguloj » de Francujo. Ili ne konis sin reciproke ĝis la nuna momento, kiam sama deziro al plua kono de Esperanto kunvenigis ilin en Esperantujo. Ili lernis la elementojn de la lingvo en diversaj lokoj, laŭ diversaj metodoj, sed ĉiuj nun havas la eblon kontroli la valoron de siaj akiraĵoj kaj de Esperanto mem. Ĉar la celo, aŭ almenaŭ la rezulto de tia kunveno estas triobla : interamikigo de gejunuloj diversregionaj (preludo de internaciaj renkontigoj), ĝusta taksado de siaj konoj, tuja kontakto kun eble la plej alloga aspekto de Esperanto : kulturo. La gejunuloj trovas tiamaniere la okazon ne fariĝi eks-esperantistoj aŭ eternaj komencantoj.

La eternaj komencantoj ne ĉiam kulpas. Oni lernas Esperanton ĉu por egoista celo, ĉu por ideala celo : disponigo al la homoj de ilo kapabla frakasi por ili lingvajn barilojn. La unua kategorio sufiĉe facile kontentiĝas, kiam la lingvo-nivelo eĉ malalta sufiĉas, por ebligi ilin pli plene ĝui siajn plezurojn. (Ne kredu, ke mi malestimas la gesamideanojn apartenantajn al tiu kategorio. Multaj el ili estas tre lertaj esperanto-lingvanoj. Sed al tiu kategorio apartenas ankaŭ la eternaj komencantoj.) Al la dua kategorio apartenas la plej aktivaj esperantistoj. Sed kiom el la gejunuloj idealistaj forlasis nian aferon post nur kelkaj paŝoj ? Kion ili serĉis lernante Esperanton ? La plenumo de malegoistaj deziroj aŭ simpla eblo de interkomuniko kun alilandaj gejunuloj. Post

kelksemajna lernado ili plej ofte deziras jam pesi siajn konojn, kaj ĉefe utiligi ilin. (Ni neniam forgesu, ke la plej multo el la personoj, al kiuj ni parolas pri Esperanto, demandas : « Por kio ĝi utilas ? » Tre frue ili povas jam uzi siajn akiraĵojn per simpla korespondado aŭ interŝanĝo de aĵoj aŭ dokumentoj. Sed tre rapide tio ne sufiĉas, kaj tie situas la decidiga punkto : se ni ne respondas la deziron de la nova esperantisto, li aŭ ŝi baldaŭ forlasos nin kaj fariĝos, eble ne malamiko, sed almenaŭ elrevigita eks-samideano. Oni ne lernas pro la nura plezuro lerni ; pro tio en la lernejoj tiom da studobjektoj estas malatentitaj ĉar la lernantoj ne « vidas » ilian tujan utilon. Tiu utilo de Esperanto varias laŭ ĉies karaktero sed la plej bona rimedo por tute interesi gejunulojn pri Esperanto estas doni al ili la okazon uzi ĝin ek de la komenco, se eble kun eksterlandanoj. Oni ne tro parolu al ili pri Esperanto ; oni interesu ilin per Esperanto. La nura scio, eĉ bona, de Esperanto, ne estu fonto de fiero : ĝi ne sufiĉas. Esperanto ne estas dio kiun oni adoras kaj servas ĉerpante plezuron el tiu adoro kaj servo. Esperanto estas preciza ilo, kies uzadon oni devas zorgeme lerni. Oni ne konservas precizan ilon en tirkesto aŭ sub vitra globo por ĝin admiri. Oni uzas ĝin kaj ĝuas la uzadon. Tion oni faras nun en la Kulturdomo dank'al la prelegantoj : Prof. Lapenna, Dro Albault, Ing. Michling kaj Dettwiller kaj pluraj aliaj konataj esperantistoj. Forirante ĉe la fino de la periodo, la 60 gejunuloj kiuj partoprenas diros : « Per Esperanto mi lernis ion pri la Fundamentoj de la Publika parolarto, pri Gottingen kaj la matematikisto Gausse, pri la okulmalsanoj, pri Provenco, pri Rabelais, pri la Ciganoj, pri la Eŭratoma organizo, pri multaj diversaj aferoj. » Esperanto estos alportinta al ili ion. Kaj tio gravas.

P. BABIN.

VI NE SCIAS

kiel aboni

« KULTURAJ KAJEROJ »

Nur rigardu la unuan aŭ la lastan kovrilpagon.

Esperanto tra la Mondo



Kien vi iros somere ?

Ni jam menciis la universalan kongreson de Sofia kaj la junularan kongreson de Vraca.

Ni citu plie :

— Kongreson de la fervojistoj, en Stockon-Trent (Britujo) ;

— Kongreson de S.A.T., en Hamburgo, 20-26-7 ;

— Ferio-Kongreson, en Krommenie (Nederland), 11-19-8 ; adreso : Fino J.A.v.d.Meulen-v. Harten, Popelstraat N. 13, Krommenie ;

— Feriajn Esperanto-kursojn, en Helsingör (Danujo), 27-28 7 ; adreso : Sro L. Friis, Ingemannsveg 9, Aabyhoj, Danujo ;

— Ferio-Semajnon, en Aarau (Svislando), komence de septembro ; adreso Esperanto-poŝt-fako 417, Aarau ;

— ... kaj ĉiujn restadojn en la kulturdomo de la kastelo Grésillon !

Novaj fakaj organizoj

— Internacia Ligo de esperantistaj fotokino-magnetfono-amatoroj funkcias kaj organizas konkurson. Adreso : ILEF, Lj. Raŝeloviĉa 21, Bela Palanka, Jugoslavio.

— Tutmonda Urbatrafika Esperanto-Federacio estos fondata dum la universala kongreso ; interesatoj skribu al : « Esperanto-fakrondo de trafika Klubo, Csengery utca 68, Budapeŝt IV, Hungarujo.

Por la kluboj de instruistaj lernejoj

Pliaj kunlaborantoj en porinstruistaj lernejoj estas bezonataj por la kolektivaj kajeroj de speciala rondo « Grainoj en Vento ». Skribu al Esperanto Grupo, Uĉiteljiŝĉe, Resljeva c. 12, Ljubljana, Jugoslavio.

Ĉu vi konas « Norda Prismo » ?

Tiu bela kultura revuo, eldonita el Skandinavio, urĉe bezonas aliajn legantojn por daŭre aperi. UEA peras la abonon.

Asocio por Farmaciistoj

Internacia Asocio de Farmaciistoj esperantistaj estis starigita. Skribu al « Farmacia », Via in Miranda 10, Romo (Italujo).

Reeldono de Zamenhofaj verkoj

« Editions françaises d'Esperanto », 11, rue Paul-Vergne, Marmande, Francujo reeldonis : « Lingvaj respondoj », en nova aranĝo farita de Waringhien kaj « Fundamento de Esperanto »,

kun komentoj kaj klarigoj de Dr Albault. Poste, la eldonisto represigos en nova vesto, « Hamleto » kaj « Marta » de Zamenhof.

Gazeto por infanoj

« Nia Voĉeto », 4, Queens-str., Chesterfield, Britujo (unu specimena numero kontraŭ unu stelo ; jarabono : 4 ekz. : 7 steloj.

Por la studentoj

Se vi deziras ricevi la informilon de Germana-Studenta Esperanto-Ligo, skribu al F. Kunze, Hamburg-Altona, Keplerstr. 33, Germanujo.

En Usono

Esperanto Scientific Center ekpublikigis trimonatan informan bultenon dulingvan : « Esperanto Scientific News » ; 1.000 ekzempleroj estos regule senditaj al kulturaj revuoj de Usono. La abono por esperantistoj estas : 2 dolaroj. Adreso : « Esperanto Scientific News », 130, West 57th St. (6-B), New-York 19.

Stratoj kaj placoj

Okaze de baldaŭa inaŭguro de « Zamenhof-dreef » en Utrecht, bonvolu sendi fotojn aŭ poŝtkartojn el vilaĝoj aŭ urboj kie jam ekzistas Zamenhof-stratoj aŭ monumentoj : J.J. Labordus, Kenaŭstrato 26, Utrecht, ed.

Enketo pri instruo de esperanto en lernejoj

La Internacia Federacio de instruistaj Asocioj akceptis fari enketon pri la atingoj de la esperantista movado en la lerneja aŭ apudlerneja fako. Por Francujo (kaj eventuale el aliaj landoj por peti informojn) skribu detale al : G.E.E. Musée Pédagogique régional, 3, rue Roquelaine, Toulouse, Francujo.

En Hindujo

Por Bengala Esperanto Instituto fondota estas jam aĉetita tereno apud Santiniketan, la universitato de Rabindranath Tagore. Kiu deziras kontribui al la fondaĵo, kontaktu Sro L. Sinha, Vinaya-Bhavana, P.O. Santiniketan, W. Bengal.

Paroladoj kaj ekspozicio okazis, por Zamenhof-festo, en Delhia Publika Biblioteko.


Pri Esperantaj Poŝtmarkoj

Laŭ letero de leganto en Madagaskaro ni anoncis, ke tiu respubliko eldonis esperantajn poŝtmarkojn. Sed la anoncitaj p.m. estas tute ne esperantaj. Ni petas la filatelistojn bonvole senkulpigi nin pri tiu eraro.

Elie en la mondo

Samarkand

(1)



« Mi dediĉas tiun-ĉi verketon al la hela memoro de mia pereinta, amata filineto Janiĉka ».

La aŭtoro.

Samarkand! Kiom da historiaj eventoj estas ligitaj kun la vivo de tiu ĉi urbo, kiun, pli ol du mil jarojn antaŭe, grekoj nomis « Marakanda » kaj ĉinoj « Samagjanj ».

La urbo vidis rajdistojn de Aleksandro la Makedona, ĝi travivis la regadon de arabaj konkerintoj, ĝin ruinigis ĝisfunde la sovaĝaj hordoj de Ĝingiz-Han. En tiu-ĉi urbo preparadis siajn militregimentojn por rabis-taj militiroj, Timur ĉirkaŭinta sian ĉefurbon per luksaj palacoj, moskeoj, medreseoj kaj diversaj monumentoj, kiuj estis konstruitaj per ŝvito kaj sango de laboranta popolo.

Samarkand! Kiomfoje la urbo eltenis la falojn kaj spertis suprenlevigojn sed malgraŭ tio-ĉi, ĉiufoje ĝi revivigadis el la cindro, kiel fabela birdo Fenikso, fariĝante ĉiufoje pli kaj pli bela, pli kaj pli ordigita...

Jam de longe mi sopiradis ekvidi la urbon pri kiu mi revis, pri kiu mi multe legis, trafoluminto de unu dekon da diversaj libroj kaj gazetartikoloj. Mi preskaŭ parkere ellernis ĝian historion kaj ŝajnis al mi, ke

Maŭzoleoj en la tombejo Ŝaki-Zinda

mi estas eternulo, kiu travivis la tutan prehistorian kaj historian periodojn en la urbo de miaj revoj, ke mi kune kun la urbo travivis kaj spertis ĝian sorton, konis ĝian planon; eĉ mi sciis kie situas diversaj historiaj monumentoj; mi mense, eĉ kelkfoje, imagis la monumentojn al mi, tamen mi neniam havis la feliĉon esti en la urbo. Strange, sed estas la fakto. Mi sopiris pri la vizito, sed la cirkonstancoj estis kontraŭ mi!!!

Sed jen, pasintjare, en la komenco de la Oktobro, mi havis la feliĉon esti sendita oficvojaĝe en Samarkandon, por agordi tie la ĵus instalitan televidan stacion. Mi havis, do, duoblan plezuron: unue mia laboro estis neordinare interesa; due finfine mi sukcesis viziti la urbon de miaj revoj kaj aspiro. Mi ne prokrastis mian forveturon.

Unu valizo kun iom da vestaĵoj, Plena Vortaro de Esperanto, logaritma kalkullineilo kaj iom da kovertoj, papero, inko por-fontplumo kaj neresponditaj leteroj de miaj geamikoj tutmondaj, estis tuta mia vojaĝhavaĵo. La taksi oĝis la aerhaveno, bileto, aviadilo IL-14 post la trapaso de 55 minutoj, elirinte el la aviadilo, mi staris sur la tero de Samarkand. Denove kelkminuta taksia vojaĝo, hotelo « Samarkand »... Mi ĝuis. Finfine mi estas en la urbo, kies eĉ sola nomo, elvokas

bildojn de mezazia prahistorio. Jam kuŝante en la lito, mi planis, ke morgaŭ, antaŭ ol komenci mian laboron, mi nepre vizitos la plej elstarajn vidindaĵojn de la urbo...

Sed mi forgesis, ke antaŭ ol rakonti al miaj legantoj pri la belecoj de samarkandaj historiaj monumentoj, mi devas konigi al ili la historion mem, almenaŭ koncizege.

Mi ne indiku ĝiajn geografiajn koordinatojn. Sufiĉas, ke oni sciuj, ke la urbo troviĝas en Sovetunia Mezia Azio. Pli scivolemaj, certe prenos la mapon de Soveta Unio kaj trovos la punkton, sub kiu estas skribita nomo « Samarkand ». Sed ŝajnas al mi, ke la plejparton de miaj legantoj pli interesas, kiel kaj kiam aperis la urbo, kiel kunmetiĝadis ĝia historia sorto...

Samarkand estas unu el la plej antikvaj urboj de Meza Azio. Ne estas konata la dato de ĝia fondiĝo, samkiel ĝi nun ne estas difinita la deveno de la vorto « Samarkand ». Multaj orientaj historiistoj opiniis, ke la unua parto de la vorto, « Samar », estas la nomo de iu konkerinta aŭ fondito de la urbo. La dua parto de la vorto, « Kent », signifas « urbo-loĝloko ».

La plej frua, atinginta nin, priskribo de Samarkand, estas menciita de antikvaj historiistoj sub la nomo « Marakanda » (329-a jaro antaŭ nia erao). En la priskribo estas menciataj la militiroj de Aleksandro la Makedona. Tiam Samarkand jam havis citadelon kaj specialan eksteran muron, kies longeco estis preskaŭ 10,5 kilometroj, kaj ĝi estis sufiĉe granda loĝloko. Ĝi okupis la teritorion nomata « Afrosiab », kiu situas ĉe la norda flanko de nuntempa urbo. Iam la tuta urbo havis la terenon ne pli ol du kvadrataj kilometroj. Sed en la jaro 328, antaŭ nia erao, post la ribelo de la loĝantoj kontraŭ la makedonaj konkerintoj la urbo estis bruligita kaj ruinigita kaj ĝia loĝantaro estis parte neniiĝita, parte sklavigita.

La urbo reviviĝis en la I-III jarcentoj de nia erao. Ĝia disvolvigo ne ĉiam estis glata,

sed estas bedaŭrinde, ke detalaj historiaj sciigoj pri tiu-ĉi periodo, forestas.

La mencioj pri Samarkand aperas en ĉinaj fontoj, jam en la Va jarcento sub la nomo « Sivanĝinĵ ».

Komence de la VII jarcento, Samarkand kaj ĝia regiono, estis la loko de vigla komerca agado. La urbo estis menciita en la verkoj de ĉiuj historiistoj, skribintaj pri Meza Azio kaj ĝi ludis gravan rolon en la historio de la lando. Jen kion skribis en sia raporto, ĉina ambasadoro Vej-Cze kiu vizitis Samarkandon inter 605-617 jaroj. « La homo de la reĝo Kan (Samarkand), estas lertaj komercistoj. Kiam knabo atingas kvinjaran aĝon, oni komencas instrui al li legopovon; kiam li sukcesas kompreni librojn, oni lin sendas studi komercan sciencan; havi profiton, estis opiniata de plejparto de la loĝantaro, bonega afero ». Tiam Samarkand havis komercajn interrilatojn ne nur kun Ĉinio, sed ankaŭ kun multaj aliaj landoj. Nur dum la periodo, inter 627 kaj 647 jaroj, el Samarkand Ĉinion, estis senditaj 9 komercaj delegitaroj. Pri Samarkand mencias ankaŭ ĉina vojaĝanto Sĵuanĵ-Czan, kiu vizitis Mezan Azion en la jaro 630. Li konstatis ke la loĝantoj de la urbo estis honestaj, bone edukitaj homoj kaj ili estis la ekzemplo por siaj najbaroj.

Treege grandan signifon, havis por Samarkand, la komerco kun Ĉinio. Dum la epoko de araba jugo, la orienta pordego de Samarkand, ĉe estis nomita « Ĉina ». La ĉinoj mencias pri tio, ke tiam, en la urbo, estis bone disvolvita metiarto, pri kio atestas, ke en Samarkand, oni bonege produktadis diversajn juvelaĵojn, artaĵojn, diversajn aĵojn, kiuj estas faritaj el argila materialo.

(daŭrigota).

Petro POLIŜUK

Taŝkent (U.S.S.R.).

La redaktoro de « Norda Prismo » skribis por vi :

ESPERANTO - KOBOLDO ⁽¹⁾

Mi jam delonge malkovris la koboldon. Pri tio atestas mia rakonto en la « Granda Aventuro » (Pri mia knabina animo). Sed ĉifoje temas pri aliaj friponaĵoj de nia propra Koboldo. Vi eraras, ne temas pri la preskoboldo, sed pri longplana maliculo, kiu tamen same kiel ĉiuj Koboldoj, fine de sia malico moke eligas sian langon. Li ne toleras gravon kaj aplombon. Nur metafore kaj fantazie, ĉar kiel ĉiuj ceteraj mitologiaj estaĵoj, ankaŭ la koboldo estas nevidebla. Kaj jen tri rakontoj pri la Koboldo, tri plendoj kontraŭ li.

Apenaŭ mi alvenis al Svedlando el Hungarujo, jam en 1934 mi havis okazon partopreni aktive la Universalan Kongreson en Stokholmo. T.e. kun du svedaj amikoj ni havis la taskon redakti ĉiutage la Esperanto-aldonon de la litotuke ampleksa sveda taga gazeto « Dagens Nyheter ». En Esperanto — por la kongresanoj. Dum dek tagoj ĉiutage ni devis solvi dilemon : kiel provizi la gazeton per taŭgaj novaĵoj kaj artikoloj, kaj kiel partopreni en la plezuroj de la kongreso, kies duopoj kaj triopoj elformiĝis sen nia kunago. Ni ne povis solvi niajn geometriajn problemojn : fari el la duopoj triangulon kaj el trianguloj cirklon. Ni estis iaspecaj almozuloj de granda plezurfesteno. Kun iom da sentimentaleco ni asertis, ke same kiel Zamenhof, ni metis nin mem sur la altaron de la devo ordonanta. Estis troigo, sed ni estis junaj.

Lun tagon mi ricevis la taskon kapti indigonon, se eble el Afriko por intervjuo. En tiu tempo Afriko estis « terra incognita » ? Ĉirkaŭ la 9-a do mi ĵetis min en la kongresan svarmon ; estis ja dumil kongresanoj kaj relative rapide mi sukcesis solvi mian malfacilan taskon : kun la helpa montrado de bonvola samideano mi direktis mian paŝon al vera afrikano en iu angulo de la

sveda parlamenta domo — pitoreske bela urboparto cetere, kie la maro kaj la ondoj de la dolĉakva Melarlago renkontiĝas en amkareso. Sed jes... la afrikano. Li estis la plej afrika afrikano de la mondo. Kvazaŭ oni estus lin eltondinta el iu aventura ĉasromano. Lia aspekto konjektigis minimume dek pafitajn leonojn. Li estis alta, kreolvizaĝa bela kaj juna viro, en tiu tempo kun tute ne kutima barbo. Malhelokula, iom ŝejkaspekta. Li estis elegantulo kaj ĉiu intervjuĉasisto devis senti kolektiĝon de la salivo en la buŝo pro la vido de tia viktimo. Proksime al li staris kelkaj sensignifaj eŭropanoj, malgrasa junulo kaj iaspeca ne juna spicvendisto aŭ eble bakisto el Germanujo aŭ Anglujo, malgravuloj, kiujn eĉ la svedaj geknaboj, kolektantaj aŭtografojn, indiferente preteriris.

Mi iris rekte al la afrikano kaj afable alparolis lin :

— Bonan tagon, samideano !

— Bonan tagon, sinjoro Szilàgyi.

Mi surpriziĝis, tre agrable. Oni konas min eĉ en Afriko ! Ĉu ? Mi ja verkis jam pli antaŭe du librojn en Hungarlando, sed mi tute ne imagis ke ili lumigis eĉ la plej malhelan Afrikon. Mi iĝis iom konfuza, sed entute mi sentis kontentecon.

Tuj post tiu ĉi komenco sekvis daŭrigo, kiu pruvis ke esperantistoj ne ĉiam povas kompreni unu la alian. Li parolis bonan Esperanton kaj ankaŭ mi, sed estis ia nebulo super kaj ĉirkaŭ ni, kiu tute miskirlis, groteskigis nian parolon. Mi volis scii pri la afrika movado kaj mia afrikano parolis pri tio, kial li ne sendis monon al mi. Tiel daŭris nia freneza konversacio dum du — tri minutoj (kun la nevideble rikananta koboldo en la fono), kiam mi fine komprenis, ke ĉi tie nur rekta, akra tranĉo kaj klara demando povas helpi ;

— Nu, kia estas la situacio de Esperanto en Afriko?

— Afriko? Ĉu vi freneziĝis?

— Ĉu vi ne estas afrikano?

— Ĉu vi ne rekonas min? Mi estas Sandor E. el Hungarlando kaj vi promesis prizorgi miajn valutaferojn en Stokholmo.

Mi furioziĝis:

— Ne koleru, sed estas tre stulte de vi kaŝi viajn trajtojn sub tia aĉa ampleksa barbo. Aŭ ĉu vi faris ian krimon? Oni ne povas rekonu vin.

La sensignifa, blankhaŭta, diketa kaj neeleganta samideano apud ni enmiksiĝis en la diskuton:

— Pardonon sinjoro. Vi eraris. Oni montris verŝajne min al vi. Nome mi estas afrikano. El Alĝerio...

Ĉi tie mi povus fini la promesitan unuan epizodon, se la Koboldon estus kontentiginta tiom da ŝerco. Sed ne estis tiel. Dum la hungara nacia festo jam post la kongreso mi ĉeesti kunvenon en la hungara legaciejo kaj komercisto, kiu venis rekte el Budapeŝto kaj estis orientita nek lingve nek topografie en Stokholmo, komencis konversacii kun mi kaj laŭdis Esperanton, kiun li ja ne parolis, li diris, sed li havis okazon sperti eĉ en

sia hotelo, kiel glate funkcias kaj kiel natura, simpatie kaj loge la internacia lingvo de Zamenhof. Baldaŭ ni komencis paroli pri la hotel-gastoj en lia hotelo, inter kiuj estis iu interesa Kristotipo, kreolvizaga, bela viro, nepre el iu alia kontinento. Mi eksuspektis ke temis pri la sama pseŭdo-afrikano, kaj baldaŭ mia suspekto praviĝis. Li tre entuziasmis por tiu viro.

— Ĉu vi parolis kun li?

— Ne, sed iun matenon li venis al mi kaj demandis ion en Esp.

— Kaj vi?

— Mi ne scias Esperanton, sed mi balbutis ion france. Sed li ne komprenis min.

— Kaj vi?

— Mi provis balbuti angle.

— Kio okazis do?

— Li respondis germane. Mi estas tre malforta en la germana lingvo, sed speciale tiam mi konfuziĝis, ke mi apenaŭ povis respondi.

— Kaj?


— Kaj ni ridetante disiĝis, sciante ke nur Esperanto povus helpi nin.

— Vi eraras, sinjoro. Kial vi ne provis la hungaran lingvon. Tiun vi ambaŭ komprenas...

F. SZILAGYI.


(daŭrigota)

Kelkaj gravaj datrevenoj




Antaŭ 80-jaroj mortis en Parizo :

Edouard MANET. — Per siaj akvafortaj gravuraĵoj, desegnaĵoj, litografoj kaj ĉefe siaj pentraĵoj, tiu granda franca pentristo preparis kaj influis impresionismon. Liaj ekspozicioj okazigis indignon de la oficialaj kritikistoj, dum la junaj artistoj entuziasmis.



Antaŭ 60 jaroj mortis en la Markizaj Insuloj :

Paul GAUGUIN. — Tiu Parizano, bankoficisto, subite forlasis sian oficon, sian edzinon kaj siajn infanojn, par vivi, kiel aventuristo, unue en Bretonio, poste en Markizaj. Insuloj, kie li sin tute dediĉis al arto. Per siaj pentraĵoj li forte influis ekspresionismon.



Antaŭ 80 jaroj naskiĝis en Berlino :

Walter GROPIUS. — Post studoj faritaj en Berlino kaj Munkeno, li fariĝis direktoro de la Akademio de Belaj Artoj kaj de la Lernejo de Arkitekturo. En 1937 W. Gropius elmigris al Usono, kie li ankoraŭ vivas. Per siaj konstruaĵoj, siaj verkaĵoj kaj sia instruoj, li donis la bazaj principoj de « arkitekturo de la industria erao ».

Oppidum'o de Enserune... fosajoj kaj Muzeo

(1-a PARTO)

La gastigema Beziers estas elirpunkto por interesaj ekskursoj jen al la maro, jen al la proksima montaro.

Sed la Muzeo de Enserune estas nepre vizitenda de la arkeologistoj. Se ĝi pli kaj pli atentigas la tutmondajn scienculojn kaj entusiasmigas tiel facile la francajn fremdajn turistojn, tion ĝi precipe ŝuldas al la esprimeblo en escepta loko, samtempe praromana fortikurbo, kaj, ĉe la sidejo mem de la eltrovaĵoj, la senlimajn arkeologiajn riĉaĵojn elterigitajn per fosadoj.

La unuaj arkeologiaj esploroj komencis en 1915 per la eltrovo, fare de Sro Mouret, de nekropolo datumita de Va ĝis IIIa jc. a.K.

Ekde 1929, la traserĉoj estis regule daŭrigataj ĉiujare dank'al monhelpo de la oficejo pri la Historiaj Monumentoj. Kaj ĉio supozigas ke ankoraŭ dum longa tempo (200 jarojn laŭ niaj takadoj) la eltrovaĵoj estos tiel abunde eltirigitaj.

La laboroj etendiĝis ĝis nun laŭ kvar diferencaj sektoroj : la du zonoj Norde kaj Sude, kiuj, tutproksime de la Muzeo, limigas la akropolon, loĝitan ekde la VIa jc.a.K. ; Okcidente, la nekropolo kun ĝia apuda loĝkvartalo ; fine, inter la akropolo kaj la nekropolo, la novurba kvartalo, iu sterniĝas ekster la unua remparo ekde la fino de la IVa jc. kaj finiĝas je la fino de la Aŭgusta epoko, t.e. dum la unuaj jaroj de nia erao.

La elteritaĵoj de tiuj laborlokoj konsistas aŭ el arkitekturaĵoj aŭ el hejma aŭ funebra meblaro.

La arkitekturaj rompaĵoj estas metitaj sur la terason, kiu utilas kiel irejo al la Muzeo, kiam ili devenas el izolaj trovaĵoj faritaj antaŭ la elfosadoj. Ili estas kolonoj, atikstilaj bazoj, toskanstilaj kapiteloj, surkolonajoj. Oni povas konjekti pri

tiuj pecoj, kaj aliaj troviĝantaj ĉe la apuda tereno « Soustres » aŭ ĉe Sro GONDARD en COLOMBIERS, ke ekzistis sur laOppidum'o imponaj



monumentoj. Unu el la kanelhavaj kolonoj ĉe Soustres, kiu estas unu metron diametro supozigas templon pli ol dek metrojn altan.

Ne estas tro riske opinii ke ekzistis en Enserune publikaj monumentoj, al kiuj apartenis tiuj arkitekturaj elementoj, kaj precipe unu aŭ multaj temploj. Unu el ili eble staris ĉe la orienta ekstremo de la spronmonto, kiu 118 metrojn alta, superstaras la ebenejon. Estas ja la plejbone protektata punkto : la deklivoj de l'Oppidum'o estas krutaj laŭ tri flankoj, kaj Okcidente, pro-

funda « vallum'o » (2) defendis ĝian aliron en la okazo se la resto de la urbo estus kaptita de la malamikoj. Bedaŭrinde, dum du miljaroj, la kultivado iom post iom ŝovis sur la deklivojn la teron kiu kovris la naturan grundon, tiel ke la arkeologia tavolo malaperis kaj kun ĝi la fundamentoj mem de ĉiu konstruo.

Ni povas situi la loko nde alia templo sudl de la Muzeo, kie la fosado elterigis multajn bestojn bruligitajn amase surmetitajn laŭ dikeco de du metroj. Eble temas pri restaĵoj de viktimoj oferbruligitaj sur altaro. Tiu sama arkeologia tavolo de la Va jc. a.K. ellasinte erojn de firstaj tegoloj en formo atentegite studita, dum la tiuepokaj domoj estis nur pajle tegmentitaj, estas perme-sate opinii ke tie ankaŭ staris religia konstruo.

La domoj en Enserune aspektas ĝenerale kiel mallarĝaj kabanoj, sen fenestroj nek kameno, kaj kun pordo sen klapoj, kie kredeble amasiĝis tuta familio kun la dombestoj. La muroj estis faritaj per ŝtonoj kotkunigitaj, la tegmento per branĉoj kaj pajo, la planko per nura premargilo. Tio implicas, ke ofte tiel rompiĝema konstruo estis firmigenda aŭ refarenda.

Tial, je ĉiu rekonstruo, oni kontentiĝis per ebenigo de la terplanko sur kiu amasiĝis la humo de la hejmaj defalaĵoj ; kaj, iom post iom tiu terplanko altiĝis kaj estigis, tavolon sur tavolo, arkeologian sedimenton, kiun ni povas taksu mez-nombre je 30 centimetroj po jarcento.

Tiuj unuaj loĝejoj, aranĝitaj ekde la Va jc. a.K. laŭ regula vico ofte ŝirmas la aperturon de silo en kiu amasiĝis la familiaj proviantoj. Necesis ja, tiuepoke kiam ankoraŭ ne ekzistis mono, dis-poni produkton por simpla interŝanĝo.

Remparo, farita el dikaj blokoj senorde amasi-gitaj, protektis tiun unuan urbon, kiu ĝis la IIIa jc. okupis la platuspaĵon. De tiu remparzono, kiu disvolviĝis laŭ 700 metrojn, ankoraŭ ekzistas : ĝia tuta norda parto, ĝia fortikpordeto konstruita multangule, kaj okcidente, ĝia plej grava pordo defendita per angulbastiono konstruita, laŭ la reguloj de la antikstrategio, kontraŭ la dekstra flanko de la atakanto.

Je la tria jarcento, nia Oppidum'o travivas gravan stadion de sia disvolviĝado. Ĉi elrompiĝas

el sia antikva remparo. Elbordiĝante direkte al Okcidento, ĝi etendiĝas iom post iom al la nekropolo, kiu estas anstataŭigita per loĝkvartalo kaj kiu mem estas baldaŭ starigonta aliloken ; ni ne scias ankoraŭ kien ? Sude, kontraŭ la suno kaj la maro, la deklivo estas ebenita laŭ kvar terasoj, sur kiuj estas laŭviciĝontaj la stratoj kaj la domoj.

Kaj tiamaniere, ĉirkaŭ la fino de la IIIa jc., la urbo etendiĝos laŭ surfacamplekso de preskaŭ 22 hektaroj kaj entenos 8 ĝis 10 milojn da loĝantoj, defenditaj per nova remparo.

Tiuepoke, la gravaj kaj bone prizorgitaj monumentoj ne mankos ; iuj rememorigos per la kapiteloj de siaj kolonoj la grandajn stilojn dorian kaj ionikan.

La plejparto el la siloj estas anstataŭigitaj per grandaj ventro-havaj vazoj similaj al la greka « pithos ». La muelŝtonoj fariĝas rotaciaj post kiam ili estis simplaj laŭ navetoj.

Sed subite tiu prospera urbo malaperas. Kio okazis ? Ĉu temas pri ekokupo surprize veninta el la Nordo, aŭ pri kontraŭbatalo de la loĝantoj dum la trairado de Anibal'o (Julio 218) iranta Italujon por tie akiri la mediteranean superregadon ; aŭ eble pri ago de rabado de la urbo najbara Beziers (antikva Bessara) kontraŭ ĝia konkurantanto ? La arkeologio ne povas decidi.

Nova urbo renaskiĝas el la cindroj de la malnova kaj eĉ reuzas en siaj muroj la bazojn, la kolonojn, la kapitulojn de la antikvaj falintaj monumentoj. Sed, unu jarcento poste, en 121, Romo alvenas kun la legioj de la prokonsulo Domitius Oenobarbus kaj la konkero de la Narbon'a regiono rezultigas la pacfirmigon.

Laŭ teksto de pastro J. GIRY
Muzeestro de Enserune.
Esperantigis Joseph SALASC
Delegito de U.E.A.
5, rue de la Citadelle
Béziers (Hérault).

(1) Oppidum = Fortikurbo.

(2) Vallum = Fortikaĵo, defendopozieto.

Rousseau en la Hungaria radio

Okaze de la ducentkvindeka naskiĝtago de la fama filozofo kaj pedagogo Rousseau la budapeŝta radio prezentis la 24 an de aŭgusto interesan mallongan teatraĵon el la maljunaj jaroj de la estimata scienculo. Ĝin verkis Albert Gyergyay.

Jen aperas la jam iom laca filozofo, sed unuavice ne kiel verkisto, kiel batalanto por ideoj, sed kiel homo.

La radioteatraĵo okazas kelkajn jarojn antaŭ lia morto, kiam li jam rezignis pri la literaturo kaj pri la publika agado, retiriĝinte en apudparizan solecon kun sia iom naiva, ne samrange instruita, sed ĉiam fidela kaj zorgema Thérèse.

Li pasigas la tempon per ĝardenkulturaĵo, plantado, muzikado kaj skribante siajn memoraĵojn, ĉar li opinias, oni lin persekutas kaj li devas defendi sin kontraŭ la kalamunioj kaj miskomprenoj. Tiutempe li skribas siajn plej kortuŝajn verkojn, parte por sindefendo, parte kaj eble unuavice por konsoliĝi en la memoroj.

Kaj tiam ekfrapas lian pordon en horo de malespero, de rezigno kaj memorado — laŭ la teatra rakonto — la juna Robespierre. Ĉu tiu renkontiĝo legenda vere okazis iam, ĉu li vere tie prenis la instruon kaj forton por poste en la Granda Revolucio realigi la plej elokventajn ideojn de Jean Jacques — kiel oni ĝenerale nomis la grandan filozon? Kiu scias? La maljunulon preskaŭ pie gardanta Thérèse eĉ ne volas enlasi la entuziasman junulon, kiu kontraŭ la rezignanta, ermite vivanta maljunulo prezentas la junularon kredantan, ageman, revolucieman. Kaj al la junulo, idolo, la malsana Rousseau ankoraŭfoje malfermas sian animon. La naiva kaj nobla adoro de la juna adepto denove ekflamigas la pli bonan memon de Rousseau kaj li denove kredas en la reciproka efiko, parolas al li pri siaj vivvojo, amadoj, pri siaj plej belaj memoroj kaj ilia babilado ĉiam pli okupiĝis pri la problemoj de la feliĉo, kies

ĉiuspecajn formojn kaj ŝanĝojn travivis iam Rousseau kaj kion la juna entuziasmulo volus realigi por la tuta homaro. La teatraĵo — dum kiu Robespierre dufoje vizitas la maljunan filozon — donas unuavice homan karakteron, sed en ties kadro ĝi proklamas la nesubpremeblan forton de la progreso, de la grandaj ideoj de la homaro, anoncanta ties riĉiĝon kaj pluan daŭran vivon.

La radioprezentado certe inde servis la memoron de tiu ĉi mondfama, ĉiam estiminda viro!

Pál BALKANYI.

NIAJ POETOJ

KIAM ESTOS LARMOJ ELLARMITAJ



Versaĵo de latva poeto Janis Poruks.
Esperantigis Aŭgusto de Glavo.

*Kiam estos larmoj ellarmitaj,
Kiam estos forĝojita ĝoj',
Kiam estos amo elamita,
Mi ekdormos je la lasta foj',*

*Tiam al monteta tomb' kvieta,
Karulin', ne venu veki min :
Amospir' kaj la sopir' turmenta
Plu ne devas eĉi en l' anim'*

*Endorminta. Nur la rozofloroj
Roson ploru en la frumaten'
Kaj la sunradioj brile oraj
Jetu aerkiŝojn de l'etern'*

*Kosma al la mia tombo flora.
Ĉirkaŭ mi silentu la natur'
Kaj amataj ĉiuj miaj karaj
Dormu pace apud mi en ter'.*

Historia mistero franca-sveda

Ĉu Feld-Marsalo Gustafson Steinbock mortis en Francujo?

En la katedralo de Upsala, la Svedoj honorigas la tombon de Feld-Marsalo Steinbock, nacia heroo, kiu batalis kontraŭ Danlando, kaj estis unu el la liberigintoj de sia patrujo el la jugo de la Danoj. Malfeliĉe, dum unu el la lastaj bataloj, Steinbock estis kaptita de la malamikoj. Li mortis, en 1717, mallibera en Danlando. Post la paco, kiu finstarigis la liberecon de Svedujo, la dana registaro redonis la korpon de la heroo. La sveda registaro honorigis lin per sepulto en la katedralo de Upsala.

Nu, franca arkeologo, doktoro François Bougarel, malkovris en la parohaj registrolibroj de Cheillé, vilaĝo situanta je 30 kilometroj sude de Tours, la jenan skribaĵon inter la listo de la personoj sepultitaj en la preĝejo : « Nobla homo alta kaj potenca Sinjoro Grafo Magnus Johano de Stinbhok, Svedo, ĉefgeneralo de la armeoj de formortinta la Reĝo de Svedujo ». La dato de la registro estas 1734.

Post longa studo, Sro Bougarel konvinkigis, ke tiu « grafo de Stinbhok » estas la feldmarsalo Steinbock. Laŭ lia tezo, la marsalo, trafinte malfavoron, post la milito, sukcesis forfuĝi, kaj rifuĝis en Francujo.

Tiel ne opinias alia arkeologo, Sro Maurice, kiu estis instruisto en Cheillé, kaj tre zorge tradudis la historion de tiu vilaĝo. Li kredas, ke tiu Stinbhok honore sepultita en la preĝejo, estis

iu trompisto, kredeble maldungita franca oficiro de la armeoj de reĝo Karolo XIIa. Por li, nerefutablaj pruvoj estas la eraroj pri la ortografio de la nomo, pri la aĝo de la mortinto. Plie, laŭ la Svedoj, Steinbock mortis en 1717, kaj la sepultito de Cheillé mortis en 1734.

Por solvi la enigmon, estis decidite malfermi la tombon. Tie, eble, troviĝos iu objekto — juvelo, fingroringo aŭ alia — kiu ebligos identigi la misteran mortinton.

La malfermo okazis la 2an de oktobro 1962. Ĉeestis multaj oficialuloj, la Inspektoro de la Belaj-Artoj, la Sub-prefektoro, du Antropologoj, la du arkeologoj, Sroj Bougarel kaj Maurice, medicinistoj, la parohestro, ka.

Tri dikaj ŝtonoj estis formovitaj kaj la sepulitejo tre zorge esplorita. Oni trovis multajn ostojn, rompitaĵn skeletojn kaj dudekon da kranioj. Estis neniam restaĵo el la ĉerkoj. Neniu objekto estis trovita, krom, fragmento de rozario kaj kelkaj najloj...

Do, la mistero laŭradas, tiom plena, tiom obskura, kiom antaŭ la malfermo de la tombo.

Eble, por niaj svedaj amikoj, ne estas mistero. Ĉar, por ili, estas sufiĉa pruvo, la sepulto de la nacia heroo en la katedralo de Upsala — kio pravigas la opinion de Sro Maurice.

E. MOTILLON.

ANGKOR - TEMPLO

En la nordo de Kamboĝo meze de la tropika arbaro vidigas la bruna maso de la templo Angkor-vat. Tiel impona ĝi estas, ke ĝi superas la egiptajn, romajn, grekajn mirindaĵojn. Ĉirkaŭita de vastaj fosajoj, ĝi konsistas el rektangulo 1.300 metrojn larĝa kaj 1500 metrojn longa. La ĉefa konstruaĵo entenas 3 teras-etaĝojn kun 65 metra turo ĉe la centro.

La kmera reĝolando estis potenca kaj prospera dum ses jarcentoj. Sed en 1432 la Kmeroj forlasis Angkor kaj malaperis. De tiu tempo la ĝangalo iom post iom superkreskis ĝin. Seda grupo de francaj arkeologoj sukcesas ĝin revivigi parton post parto.



POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Jen la du lastaj problemoj de nia konkurso 1962-1963. Bonvolu sendi viajn respondojn antaŭ la 31a de Majo 1963 al :

S-ro P. CHEVALIER
19, boulevard G.-Lauriol
Nantes (L.-A.) Francujo

I. — UNUA PROBLEMO (20 poentoj) Kaŝita proverbo

1. Korpo ; 2. borilo ; 3. spiro ; 4. lamento ; 5. salato ; 6. klaĉo ; 7. planko ; 8. kurado ; 9. insulto ; 10. pilastro ; 11. mondo ; 12. galerio ; 13. lozango ; 14. karoto ; 15. faldi ; 16. oblato ; 17. fulmo ; 18. karobo ; 19. korko ; 20. korano ; 21. pensi ; 22. glando ; 23. kuiri ; 24. skeleto ; 25. kaliko ; 26. mango ; 27. gorilo.

Elprenu el ĉiu supra vorto unu literon tiel, ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, formu novan vorton. La elprenitaj 27 literoj en la numerita vico prezentos malnovan proverbon, kies pravecon pravas multaj spertoj.

II. — DUA PROBLEMO :

(po 1 poento por ĉiu ĝusta korektado)

Bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj prepozicioj en la ĉisubaj frazoj.

I) La preparoj... la proksima kongreso estas en bona vojo... efektiviĝo.

II) Lernigu la manieron... kiu oni devas vivi... personoj... bona deveno.

III) La tuta lando de la venkita reĝo transiris... posedon de la venkinto.

IV) Mia kuzo estas profesoro... la Universitato.

V) La bestego dissirus min... pecetoj.

IV) Permesu... mi diri... vi adiaŭ.

III — TRIA PROBLEMO

(nur por dispartigi la ekvalgajnintoj)

I) Kiom da personoj partoprenis la ĉiaran konkurson ?

II) Al kiom da nacioj apartenas la konkur-santoj ?

Se vi deziras ricevi la korektitajn problemojn (almenaŭ la gramatikajn) bonvolu tion sciigi kaj kunsendi respondkuponon (aŭ poŝtmarkon por la Francoj), kaj ne forgesu skribi vian precizan adreson. (Speciale : S-ro, S-ino aŭ F-ino).

La gajnintoj estos informataj rekte de la redaktanto.

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solve de la lasta problemo « mankas kelkaj haroj » : La 8 diferencoj estas : 1) la dorsapogilo de la seĝo ; 2) la kvara piedo de la seĝo ; 3) botelo sur la suba breto ; 4) la malsupra linio de la spegulo ; 5) la brust-poŝo de la frizisto ; 6) la ĉemiz-kolumo de la frizisto ; 7) grandeco de la spegulo ; 8) linio de la surtuto de la frizisto (inter la kruroj de la klientino).

NOVA PROBLEMO

(de S-ro JARLIER)

La divido : La sumo de 2 nombroj estas : 218. Ni dividas unu per la alia : la kvociento estas « 4 » kaj la resto estas 13. Kiuj estas la du nombroj ?



BONHUMORO



Vi ne diros, ke li ne estas via !



Venu ĉi-tien, mi restarigos vin !



*Aŭskultu ! La kvinan ! Kie ili trovis sufiĉan
monon por trinki tiom da ĉampano.*

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).
- Belgujo** : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18 (50 fcs).
- Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).
- Germanujo (Okc.)** : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).
- Germanujo (DDR)** : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).
- Hispanujo** : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).
- Italujo** : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.
- Jugoslavio** : S-ro Lehotkay K. Fereĉ, ul Petefij eva 27, ZRENJANIN (300 din).
- Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).
- Danlando** : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).
- Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).
- Svedujo** : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM S3, Postgiro : 157007.
- Svilando** : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).
- Usono** : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).
- Aliaj Landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandaĵn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la Esperantista Kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo